

Unuo 7

Internacia reto de universitatoj pri lingva justeco

Mi prenas kelkajn punktojn de la antaŭaj unuoj:

1. Universitatoj kaj universitatoj emas sekvi ununuran saman tutmondan vojon, kiu sukcese plenumas iliajn agendojn.
2. Ĉio kio loĝas ekster tiu vojo havas malfacilan sukceson.
3. Esperanto situas en la malhela flanko.
4. Se oni rekte parolus pri Esperanto, la plej ebla reago estus rifuzo.

Celo

Ĉi tiu projekto celas meti Esperanton en la universitaton per ne rekta metodo, profitante flankojn, kiuj estas tute videblaj kaj ĉefrolaj. Ankaŭ klopodas profiti la universitatan strukturon, kiu gravas por kompreni kiel funkcias la universitatoj.

Konkrete la projekto konsistas el starigo de internacia universitata reto, subskribita de rektoroj. La celo de la reto estas havi profiton de la interkomunikado, solvante la lingvan problemon tiel, ke la reto atingu ekvilibrantan interrilaton. La priskribo de la celo devas esti sufiĉe malfermita aŭ ĝenerala, por faciligi enmeti Esperanton en estonta paŝo.

Laŭ mia scio, ĉiu rektoro ŝatas subskribante partopreni internacian universitatan reton pri... tute ne gravas la enhavo. Tia ŝato kaj emo des pli elstaras ju pli famaj estas la universitatoj, kiuj jam partoprenas. Do, tiu projekto bezonas la partoprenon de universitatoj, kiuj havas altajn poentojn en la internaciaj vicordoj, kaj ĉefe kiuj estas usonaj aŭ britaj. Ankaŭ aliaj, kiel germanaj, francaj, nederlandaj, ĉinaj aŭ japanaj kutime havas bonan akcepton.

Metodo

Ĉi tiu projekto bezonas malgrandan grupon de universitatoj, kiuj laboras en institucioj el malsamaj landoj, kaj bone konas sian universitaton.

Inter la anoj, oni redaktos la precizajn celojn de la reto, la strategion kaj la dokumentojn. Ĉiuj universitatoj havas modelojn por internaciaj interkonsentoj, kontraktoj aŭ paktoj. Se la fina dokumento sufiĉe similas al tiaj modeloj, la subskribo ne havos gravan problemon.

La universitatoj uzas ĝeneralan interkonsenton, kiu estas sufiĉe malfermita, kaj specifajn interkonsentojn, kiuj starigas laŭ la ĝenerala.

Esperaton aperos en la dua aŭ tria interkonsento, kiel natura disvolviĝo de la origina ideo. Ekzemple, komisiono kiu starigas danke al unua teksto subskribita, konkludas pri la neceso eksperimenti per alia lingvo ol la angla, nur kiel eksperimento, por science studi la konsekvencojn, kiujn oni povus atingi estontece, se la eksperimento rezultos sukcesa.

Mi jam parolis kun respondeculoj el mia universitato, kiu estas mezepoka (pli ol 500 jarojn de historio) kaj granda (90 milojn da anoj). Ilia sinteno estas tute pozitiva kaj mi surmane havas modelon por facile subskribi.

Procezo

1. Aranĝi laborgrupon de esperantistoj universitatoj, kiuj havas eblojn atingi la modelojn kaj babilu kun la respondeculoj.
2. Atingi la modelojn, studi ilin kaj kunredakti proponon. Oni devas atingi taŭgan dokumenton, kiu estu sufiĉe alloga sed ne ŝajnu tro grava. Se la afero ŝajnas stulta, rektoroj ne subskribos. Se ŝajnas tro grava kaj profitinda, la universitato elektos laŭ siaj propraj kriterioj la membrojn, kiuj partoprenos la internacian reton kiel reprezentantoj, plej eble ne esperantistoj. Strategia celo estas ke la samaj homoj, kiuj proponas la aferon al sia universitato, estos ankaŭ la reprezentantoj aŭ kunlaborantoj en la reto.
3. La laborgrupo decidus strategion de longa tempo, por kalkuli ĉiun sekvantan paŝon. Laŭ tiu strategio oni redaktos la ĝeneralan interkonsenton.

Tute gravas, ke de la unua momento partoprenu almenaŭ unu universitato el Usono kaj alia el Britio. Estus bone, ke ankaŭ ni havu kunlaboron de universitatoj el aliaj landoj de la OECD aŭ riĉaj famaj landoj, kiel Japanio, Ĉinio, Rusio, Germanio, Nederlando, Francio, Kanado ktp. Landoj kiel la mia, Hispanio kaj la ceteraj estos bonvenaj por la unuaj momentoj, sed ne necesaj. Bedaŭrinde ĉi tiel funkcias la universitatoj.

Gravas, ke ni ne estu tro por pripensi kaj atingi la ĝeneralan interkonsenton. Post atingi ĝin, oni povas disvastigi ene de Esperantujo, kaj akcepti aliajn partoprenojn. La grandeco de la reto estas ankaŭ bona kialo por ke la rektoroj emos subskribi. Sed ju pli granda estas la grupo de unuaj kunlaborantoj des pli malfacile oni kunlaboros. Pro tio, unue ni atingi ĝeneralan interkonsenton, kaj poste ni atingi pli da kunlaborantoj kaj subskribantoj.